

# Kial ni hejtas la hejmon sed ŝajnas fajfi pri la fajlado?

Christer Kiselman

Enhavo:

1. Enkonduko
2. Gold kaj Szerdahelyi
3. Malnovaltgermanaj vortoj kun *ej* kaj *ĭ*
4. Konkludo  
Bibliografio

## 1. Enkonduko

La Esperantaj vortoj *hejti*, *hejmo*, *ŝajni*, *fajfi* kaj *fajli* kun la diftongoj *ej* kaj *aj* sendube estas de ĝermana origino. En la germana, ekzemple, ili estas *heizen*, *Heim*, *scheinen*, *pfeifen* kaj *feilen*, do ĉiuj kun *ei*. Kial kelkaj el tiuj *ei* respondas al *ej* kaj aliaj al *aj*? Kial ni ne hajtas la hajmon kaj ŝejnas fejfi pri la fejlado? Se oni konas nur la germanan lingvon, oni ne povas diveni; la elektoj inter *ej* kaj *aj* ŝajnas esti pure hazardaj. Ĉu la origino povus esti la jida? La celo de tiu ĉi noto estas iom esplori tiun aferon, por vidi ĝis kiu grado oni povas aserti ke la jida estis la fonto por Zamenhof.

Mi kore dankas al David L. Gold pro multaj gravaj komentoj al antaŭaj versioj de tiu ĉi artikolo, tute speciale pro indikoj pri la prononco de la jida, al Ebbe Vilborg pro valoraj atentigoj, kaj al Ragnar Sigurðsson pro helpo pri islandaj vortoj.

## 2. Gold kaj Szerdahelyi

David L. Gold skribas pri *hejmo* kaj *hejti* en sia studo de 1980: “It is hard to believe that Zamenhof would borrow these words from Yiddish and we must therefore link them in some way with German. There is a North German pronunciation of *heizen* with /ej/, but Zamenhof borrowed only from standard varieties of languages and would not have taken nonstandard German pronunciation into consideration.” Li daŭrigas: “The answer is that Zamenhof borrowed the Schriftbild, rather than the Lautbild, of these German words.” (Gold 1980: 316.) Sed en la kazoj de *fajfi*, *fajli* kaj *ŝajni* li evidente elektis la “Lautbild”. Kial do? Gold citas hipotezon de Richard E. Wood ke la diftongo *ej* estas parte de jida origino.

István Szerdahelyi en sia artikolo de 1987 diras tute ĝenerale: “La modelo de la D-transkribo estis la J kiel peranto inter D kaj E” kaj listigas la germanajn vortojn *Heim*, *feilen* kaj *pfeifen* kiel la originojn de *hejmo*, *fajli* kaj *fajfi*, sed ne komparas ilin kun la jida. (Szerdahelyi 1987: 123; vidu ankaŭ la recenzon de Gold 1987.)

### 3. Malnovaltgermanaj vortoj kun *ej* kaj *ī*

La kvin vortoj kun *ej/aj* en la titolo estas Fundamentaj; *hejti*, *fajfi* kaj *ŝajni* aperas eĉ en La Unua Libro de 1887. Ni serĉu la malnovaltgermanajn originojn de ili kaj de kelkaj aliaj. Tiam aperas tre klara desegno. Tiu ĉi fariĝas eĉ pli klara se ni listigas ankaŭ respondajn vortojn en kelkaj aliaj ĝermanaj lingvoj, inklude de la jida en ties nordorienta formo. Zamenhof vivis en Bjalistoko ĝis la aĝo de 14 jaroj, kaj la bjalistoka jida estas varianto de la nordorienta jida. Unue la vortoj kun *ej*:

malnovaltgermana germana	<i>heim</i> <i>Heim</i>	<i>heiz</i> <i>heiz</i>	<i>stein</i> <i>Stein</i>	<i>eigan</i> <i>eigen</i>	<i>ein</i> <i>ein</i>
jida nederlanda islanda sveda	<i>heym</i> <i>heem</i> <i>heimili</i> <i>hem</i>	<i>heys</i> <i>heet</i> <i>heitur</i> <i>het</i>	<i>shteyn</i> <i>steen</i> <i>steinn</i> <i>sten</i>	<i>eygn</i> <i>eigen</i> <i>eigin</i> <i>egen</i>	<i>eyn</i> <i>een</i> <i>einn</i> <i>en</i>
malnovangla angla	<i>hām</i> <i>home</i>	<i>hāt</i> <i>hot</i>	<i>stān</i> <i>stone</i>	<i>āgen</i> <i>own</i>	<i>ān</i> <i>one</i>
Esperanto	<i>hejmo</i>	<i>hejti</i>	<i>ŝtono</i>	<i>propra</i>	<i>unu</i>

En la kolumno de *hejti* mi enskribis la vortojn en la koncernaj lingvoj kun la signifo ‘varmega’, ĉar mi ne trovis tradukojn de *hejti* en ĉiuj lingvoj; cetere la adjektivo *ŝajnas* doni la plej klarajn analogiojn. En la jida la verbo estas *heytsn*.

Ni vidas ke la malnovaltgermana *ei* respondas al la jida *ey*, la nederlanda *ee* (krom en la kazo de *eigen*), la islanda *ei*, la sveda *e*, la malnovangla *ā* kaj la angla *o*, kaj finfine en Esperanto *ej* en la du unuaj kazoj. En la tri lastaj estis faritaj aliaj elektoj; se Zamenhof estus sekvinta la modelon de la unuaj por la vortoj *propra* kaj *ŝtono*, ili certe estus *\*ejgena* respektive *\*stejno* aŭ eble *\*ŝtejno*.

Kaj nun la vortoj en la samaj lingvoj respondaj al kelkaj Esperantaj vortoj kun *aj*, plus la riveronomo *Rejno*:

malnovaltgermana germana	<i>pfīfa</i> <i>pfeifen</i>	<i>vīlen</i> <i>feilen</i>	<i>skīnan</i> <i>scheinen</i>	<i>Rīn</i> , <i>Hrīn</i> <i>Rhein</i>
jida nederlanda islanda sveda	<i>fayfn</i> <i>pijpen</i> <i>pīpa</i> <i>pipa</i>	<i>fayln</i> <i>vijlen</i> [ <i>thjöl</i> ] <i>fila</i>	<i>shaynen</i> <i>schijnen</i> <i>skīna</i> <i>skina</i>	<i>rayn</i> , <i>reyn</i> <i>Rijn</i> <i>Rín</i> <i>Rhen</i>
malnovangla angla	<i>pīpa</i> <i>pipe</i>	[ <i>fēol</i> ] <i>file</i>	<i>scīnan</i> <i>shine</i>	<i>rīn</i> <i>Rhine</i>
Esperanto	<i>fajfi</i>	<i>fajli</i>	<i>ŝajni</i>	<i>Rejno</i>

Ĉi tie la malnovaltgermana *pfīfa*, la islanda *pīpa* kaj malnovangla *pīpa* signifas fajfilo.

La klasika formo de la moderna islanda *thjöl* ‘fajlilo’ estis *thél*, en la malnovsveda *fel*, *fæ*. La sveda vorto *fil* ‘fajlilo’ estas prunto de la malaltgermana *vīle*. Tiel la vortoj povas alveni al unu lingvo laŭ pluraj vojoj.

La malnovaltgermana  $\bar{i}$  respondas en la nederlanda al *ij*, en la islanda ĝenerale al *í*, en la malnovangla ĝenerale al  $\bar{i}$ , en la angla al *i*, kaj, en la tri unuaj kazoj, en la jida al *ay*, en la sveda al *i*, kaj en Esperanto al *aj*.

Pri la nomo *Rejno* estas iom alie, ĉar laŭ la malnovaltgermana, nederlanda, islanda, malnovangla kaj angla ĝi devus esti *\*Rajno*. (Notu tamen la anglan adjektivon *Rhenish* ‘rejna’, de la latina *Rhenus*.) Ke Zamenhof elektis *Rejno* kaj ne *\*Rajno* povas esti pro influo de la rusa maniero transskribi germanajn nomojn kaj pruntvortojn el la germana: ruse *Rejn'* (nuntempe *Rejn*), simile *Ējnštejn* por *Einstein* kaj *rejnvejn*, *mejsterzinger* de la germanaj *Rheinwein*, *Meistersinger*. En jidaj vortaroj la river-nomo estas kutime *rayn*. David Gold, en privata letero al la aŭtoro, skribas: “I have now determined that the Yiddish *rayn* is a recent borrowing of New High German *Rhein*. The traditional Yiddish name for the river is *reyn*.” Li daŭrigas: “However, I am not certain that Zamenhof knew the traditional Yiddish word. Speakers of Eastern Yiddish did not have occasion to talk about that river.”

Kiel jam dirite, la jidaj vortoj en la du tabeloj estas donitaj laŭ sia bjalistoka prononco. En la varsovia jida estas alie: al *ey/ay* en Bjalistoko respondas la distingo *ay/ā* en Varsovio.

Per tiu komparo mi ja tute ne volas aserti ke Zamenhof konis aŭ estis influita de la nederlanda, la islanda aŭ la sveda. Sed mi volas montri ke la distingo inter *ei* kaj  $\bar{i}$  en la malnovaltgermana, kiu perdiĝis en la germana, estas ankoraŭ konservita en pluraj modernaj ĝermanaj lingvoj, kaj ke tiu distingo iel travivis en Esperanto. Ekzakte laŭ kiuj vojoj kaj pro kiuj kaŭzoj?

#### 4. Konkludo

La distingo en la malnovaltgermana inter *ei* kaj  $\bar{i}$  estas konservita, kaj skribe kaj prononce, en pluraj ĝermanaj lingvoj: la jida (*ey* disde *ay*, aŭ *ay* disde  $\bar{a}$ ), la nederlanda (*ee* disde *ij*), la islanda (*ei* disde *í*), la sveda (*e* disde *i*), la malnovangla ( $\bar{a}$  disde  $\bar{i}$ ) kaj la angla (*o* disde *i*). Ankaŭ en Esperanto la distingo estas farita: *ej* disde *aj* en la ekzemploj traktitaj ĉi tie. Nur en la germana ili kunfandiĝis al unu sola *ei*.

Tre kredeble la distingo estas kaj estis farita en pluraj germanaj dialektoj. Mi ne kuraĝas ekskludi ke Zamenhof estis influita de iu dialekto de la germana. Mi ne scias kiel li prononcis la germanan, nek kiel la germanoj en Bjalistoko aŭ Varsovio prononcis ĝin. Sed Gold (1980: 316) kaj Vilborg (en persona letero al la aŭtoro) certigas ke ni ne bezonas konsideri germanajn dialektojn, nur la norman altgermanan lingvon de la tempo de Zamenhof.

Ebbe Vilborg, en persona letero al la aŭtoro, substrekas ke la elekto de *aj* en *fajfi*, *fajli* kaj *ŝajni* larĝigas la bazon de tiuj vortoj, t.e. ke per tiu elekto Zamenhof sukcesis doni al la vortoj iun elementon, skriban aŭ prononcan, de pli multaj lingvoj (same kiel *ŝtono* estas kompromiso inter *Stein* kaj *stone*). Tio ja eblas ĝuste ĉar la distingo travivis en ekzemple la angla: la tri vortoj kun *aj* similas prononce al anglaj vortoj. Ni notu ke oni povas same bone turni tiun ĉi argumenton: ĝuste tiel Zamenhof havigis al si oficialan pretekston por sia spontanea prefero de la jidaj formoj.

Mi volas fari la jenajn konkludojn:

1. Por kompreni la elekton inter *ej* kaj *aj* en la menciitaj kazoj estas tute netaŭge preni la germanan kiel fonton. Ne indas klopodi ligi ilin iel kun la germana.<sup>1</sup>
2. Ke la jida lingvo estas la fonto de la Esperantaj vortoj traktitaj ĉi tie estas la plej simpla kaj la plej verŝajna klarigo.
3. Tamen, ĉar analoga distingo estas tute sisteme farita en pluraj ĝermanaj lingvoj, ne eblas kun absoluta certeco pruvi kio fakte estis la kaŭzoj de la elektoj faritaj de Zamenhof.<sup>2</sup>

Ĉiu jam konas la respondon al la demando de la titolo. Ĝi ja estas *Kial ne?*, se estus nur pro tio ke lingvo estas pura konvencio. La elekto de vortoj en planlingvo ĉiam enhavas iom da hazardo. Sed la rimarkinda afero en la kazoj traktitaj ĉi tie estas ne la hazardo, sed la sistemeco rilate al la bjalistoka prononco de la jida.

Por provi kompreni la estiĝon de Esperanto la demando estas interesa, mi opinias. Respondo trans la ĉiea *Kial ne?* kredeble ĉiam restos malcerta. Sed demando tamen estas la maldekstra mano de respondo.

## Bibliografio

Gold, David L.

- 1980 Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto. En: *Miscellanea Interlinguistica* (Red. I. Szerdahelyi), 300–367. Budapeŝto: Tankönyvkiadó.
- 1987 Recenzo de Szerdahelyi 1987. *Jewish Language Review*, **7**, 412–413.

Szerdahelyi, István

- 1987 Principoj de Esperanta etimologio. En: *Studoj pri la internacia lingvo* (Red. Michel Duc Goninaz), 109–138. Gent: AIMAV

---

Adreso de la verkinto: Upsala Universitato, Matematika Instituto,  
Poŝtkesto 480, SE-751 06 Uppsala, Svedujo.

Telefono: +46 18 471 32 16 (oficejen); +46 18 30 07 08 (hejmen)

Fakso: +46 18 471 32 01

Komputilreta adreso: [cok@math.uu.se](mailto:cok@math.uu.se)

---

<sup>1</sup>Gold (1980:316) volis fari tion, sed nun (en persona letero al la aŭtoro) aliĝis al miaj konkludoj.

<sup>2</sup>Vidu la klarigon de Vilborg supre.